# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 10/06/2021 Kvincenttridekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer


rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 808,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo




Nun studas **279,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **231,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **207,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **91,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde septo 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).






N.ro 38 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kio estas la gramatika objekto de la ĉefpropozicio en "Mi bedaŭras ke li manĝis la tutan torton".
2). Kio estas la gramatika objekto en "Li manĝis, tio estas li manĝaĉis, la tutan torton".
3). En "Li ĉiam estis fidela amiko" oni nomas "fidela amiko" la predikativo". Kio estas en tiu propozicio (= frazo) la predikato?
Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 534.

*Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)



## _La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Altnivela parolkapablo Esperanta Retradio 31a Majo 2021

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas de 10.30 atm ĝis 12tm la unuan kaj trian sabatojn de la monato. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater Cafe 28-29 Suda Stejno. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. La ĉeestantoj tie diskutas la plej sekuran lokon por la kunveno laŭ la vetero kaj homamasoj. La 5a de junio estis la unua sabato. Venis Roger, Chris kaj John.




*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

# TORQUAY ESPERANTO COFFEE CLUB




Mi havas filinon, kiu laboras en hospitalo kaj loĝas en domo ĉirkaŭita de kvin akreoj da tero. Ŝi havas ŝafojn sur sia havaĵo kaj ĵus revenis de la laboro por trovi ke unu el ŝiaj ŝafoj naskis. Ĉi tio instigis min adapti konatan poemon:



Maria havis ŝafideton,
kies ŝaflano estis nigra kaj blanka.

Kaj ĉie, kien Maria iris,
la ŝafido paŝis.

Ĝi sekvis ŝin al hospitalo unu tagon
kio kontraŭis la regulojn.

Ĝi igis la kuracistojn ridi kaj rigardi,
vidi ŝafidon en "Care".

Kaj tiel la kuracistoj reagis,
sed tamen ĝi restadis proksime,


Kaj atendis pacience,
ĝis Maria aperis.

"Kial la ŝafido tiel amas Maria-n?"
la fervoraj kuracistoj ploras.


"Nu, Maria amas la ŝafidon, vi scias."
la pacientoj ja respondis.



Amike *John Adams*




Antaŭ kelkaj jaroj, mi renovigis la ŝlosil-libreton por uzi ĝin por propagandi Esperanton. Margaret Chaldecott retajpis la gramatikon Roger ĝisdatigis la ceteron kaj Vera Payne provlegis. Mi ne deziris pligrandigi la libreton, alie ĝi estus nur alia lernolibro. La celo estas studentoj de lingvoj por ke ili povu kompari la grandecon kaj logikon de Esperanto.




*Roger Springer*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## Oni devas labori aŭ se ne, oni ne kontribuas al la homaro??

## La tasko de la plej multe de la Homaro estas konsumi.

## Ĉiuj mondaj registraroj celas ke ĉiuj laboras. STULTE!

### Ebleco por la konsumado nun bezonas monon.

Ĉar ili konsentas ke oni devas labori por havi monon aŭ ili ne havas valoron.
Ne gravas ĉu la laboro estas utila aŭ se oni senutile laboras .
Nur gravas ke oni havas monon kaj uzas monon por subteni la ekonomion.
Nun pro la teknikaj progresigoj ne ekzistas multego de la antaŭaj bezonaj taskoj por subteni la popolon.
Do oni inventis taskojn, ĉar la maŝinaj/komputilaj aĵoj bezonas aĉetantojn.
Do la mondo inventas taskojn kiuj ne vere estas utilaj: inter aliaj: militojn, milojn de militanoj, industriojn militon subtenantajn, modajn industriojn, aĵojn por unu nura uzo, ktp
Ni konas multajn laborpostenojn kiujn la konviruso detruas. Nur malfermu la okulojn.
Aĵoj bezonas aĉetantojn kaj aĉetantoj bezonas monon.

**Kio estas Mono?** Mono estas la havebla energio en la mondo.
Ĉu homa aŭ besta Laboro? La Suno? Vento? Gravito? ktp. aldonatas ankaŭ la rezervejo de energio de antaŭaj jaroj Oleo? Gaso? Karbo? Atomo?
Ĉar mono egalas energion nun ekzistas malmultaj riĉeguloj kiuj nevideble regas la mondon.
La bankmono (banknotoj, komputilaj ciferoj) estas ligita al energio, Ili devas egali al energio.
Landaj kontekspertizistoj balanciĝas ĝin sed se ne, la inflacio kaj malinflacio kontrolas tion.
Do la monda problemo estas kiel ĝuste dividi tiun monon al la Homaro por ke ĉiuj povu vivi feliĉe kaj sane. Ĉu Universala Pensio? Ĉu vi konsentas?? *Roger Springer*

## Universala Pensio povus:



Doni sekuron al via vivo.
Forigi la ideon ke oni devas labori aŭ morti.
Liberigi inojn de maldecaj postuloj por resti en iu laboro.
Forigi la neceson vendi la korpon, ktp por la vivmono.
Liberigi la ekonomiajn sklavojn.
Neniuj devos timi malcertan estontecon.
Trankviligi la popolon.
Malpli da homoj mensmalsanas
La maŝinoj kaj komputeroj nuligas la neceson ke ĉiuj devas labori.
Doni la eblecon al ĉiuj havi parton de la riĉaĵo tiel produktita.
Lasi la laboron por tiuj kiuj deziras labori kaj havi pli da mono.
Permesi riskajn projektojn ĉar se oni fuŝos oni ne malsatmortos
Nunaj pensiuloj ne rajtas labori sen perdo de parto aŭ de la tuto de la pensio.





**Senhavaj homoj ŝtelos, oni ne malsatmortas en paco.**

**Kion vi opinias?.** *Roger Springer*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**La UBE ne sigifas ke oni ne povas labori por havi pli da mono kaj pli bonajn vivkondiĉojn.**

## Mi emeritiĝis antaŭ tridek kvin jaroj. Nenia problemo!

Miaj ŝatokupoj plenigas la jarojn kaj investadetoj donas al mi sufiĉe da mono. *Roger Springer*

## Dresden



Eble iuj el niaj germanaj legantoj jam vizitis en la urbo Dresden konstruaĵon kiu verŝajne ludas muzikon kiam ajn pluvas. La blua, plurnivela domo estis desegnita tiel, ke reto da defluiloj, tuboj kaj funeloj, variantaj laŭ grandeco, ornamas la fasadon, kaj kiam pluvo malsupren gluglas, la sistemo ja kreas muzikajn sonojn! Almenaŭ tion mi legis. Sed kiam mi Google-is, mi ja vidis la konstruaĵon, sed aŭskultis - nur pluvon. Mi scivolas, ĉu la priskribo estas vaste troigita, aŭ ĉu vere oni povas aŭdi iun 'muzikon'. Situas ĉirkaŭ la kortumo ankaŭ aliaj brilkoloraj domoj, reliefigantaj aliajn artaĵojn. Laŭdire, la projekto allogas turistojn - kompreneble precipe dum pluvo. Mi antaŭĝuas komentojn de vizitintoj el ĉiu ajn lando.

*Vera Payne.*





## 3ZZZ



La elsendo de la 7a de junio 2021 enhavas la lastan parton de la prelego de Paŭlo Sergio Viana, en kiu li klarigas kiel Sebastao Salgado sukcesis rearbarigi la Aktlantikan arbaron. Ĉu vi konas tiun nekutiman reĝon/ imperiestron Ferdinando? Ĉu vi scias kia estis Puŝkin en la ĉiutaga vivo? Eksciu pri ili, aŭskultante tiun elsendon.

Mi atentigas aparte la melburnajn membrojn de la radio 3ZZZ ke la jarkunveno planita la 11an de junio je la 4.00 ptm ne povas okazi pro tio ke ni ne rajtas iri pli for ol 25km . Kiam la registaro permesos al ni pli for veturi ni elektos alian daton . ....*Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)* **SOLVO DE LA KVIZETO 38**



1). “ke li manĝis la tutan torton”.
2). “la tutan torton”.
3). “estis fidela amiko”. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## *Aliĝilo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK): https://vk.esperanto.net – senpaga por individuaj membroj de UEA aliĝintaj ĝis la 4-a de julio!*

**Saluton! Ĉi-jare okazos duafoje la VK (Virtuala Kongreso de Esperanto) – kaj aliĝo al ĝi estas senpaga por individuaj membroj de UEA/TEJO, kiuj aliĝas ĝis la 4-a de julio. Post tio aplikiĝos kotizo. Tial ni kuraĝigas vin tuj aliĝi al la 2-a VK pere de la VK-aliĝilo:** https://vk.esperanto.net.

La 2-a VK estos la ĉefa Esperanto-evento de la jaro. Aliĝi al ĝi estas facile – kaj senpage por individuaj membroj de UEA! Por aliĝi oni devas simple aliri la ligilon https://vk.esperanto.net. Atentu, ke por aliĝi, sufiĉas informi vian UEA-kodon. Ĉiuj instrukcioj pri tio estas en la aliĝilo. Gravas tamen, ke vi uzu unikan retadreson (ne eblas, ke du homoj aliĝu per la sama retadreso).

Se vi volas fari donacon, eblas tion fari per kreditkarto aŭ per UEA-konto: ni antaŭdankas pro tio, ĉar, pro la nuligo de la UK, via helpo, kia ajn ĝi estas, estos tre valora.

2a VIRTUALA KONGRESO DE ESPERANTO

17–24 de JULIO 2021

Aliĝintoj al la VK ankaŭ ricevos la kongresan kurieron senpage. Ĝi nomiĝas *La Kolombo de Paco* kaj la 1-an numeron jam eblas legi ĉe revuoesperanto.org/kolombo_1. Do rapidu aliĝi por ricevi la aliajn numerojn!

Kaj se vi volas kontribui al la VK-programo, jam estas formularo pro ricevi proponojn por la kerna programo de la 2-a VK: https://mallonge.net/e2. La kerna programo gastigas diversajn programerojn kiel prelegoj, paneloj, debatoj, aŭtoraj momentoj, libroj de la jaro, artaj kaj kulturaj prezentoj k.s. Formularo por aliaj programeroj ekster la kerna programo disponeblos aparte (ekzemple, por la Virtuala Movada Foiro). Rapidu: la fermo de la formularo estas planita por la 14-a de junio 2021 kaj nepras, ke proponantoj kaj partoprenontoj de la programero estu ĉiuj aliĝintaj al la 2-a VK: https://vk.esperanto.net.

**De nun ni deziras al vi bonegan kongreson!**

UEA/TEJO

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***